



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Junio 2016 n-ro: 6

Saluton !

En la monato de junio ni prezentas al vi 24-paĝan revueton, plenplenan kun tekstoj por legi kaj plibonigi vian Esperanton.

En la someraj monatoj ni pensas malaltigi la nombron de paĝoj ĉar ĉiu estos for en somerdomoj kaj ferioj. Plue la tasko pleniĝi 24 paĝojn ja estas malfacila kaj por redakti la tekstojn estas bezono de alia Esperantisto. Do eble la optimuma nombro da paĝoj estas 12 por la someraj numeroj kaj 16 aŭ 20 por la ekster someraj numeroj.

En ĉi tiu numero estas grava artikolo de Carlo Minnaja pri Julio Baghy unu el la plej gravaj verkistoj de Esperantujo. La artikolo estas alt-nivela do vi devas legi ĝin tre atenteme kaj lerte.

En ĉi tiu numero ni komencis publikigi rakonton por pogramantoj. Ĝi estas la "Juna Detektivoj" iam publikigita de la Brita Esperanto Asocio. Laŭ la kritikistoj ĝi ne estas tiel bone verkita novelo sed nia celo estas legi ka lerni pli bone la lingvon. Do ĝi povas esti helpema al via lernado de lingvo. Ĝi ne estas tiel longa libro kaj ni publikigos ĝiajn 7 ĉapitrojn kiel serio en nia revueto.

Kun la tria kaj fina artikolo en Gramatiko ni finis la temon pri "akuzativo". Bonvolu relegi ilin denove por lerni kiel uzi la akuzativon.

Bonan legadon al ĉiuj...



CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Merhaba !

Haziran sayımızda size dolu dolu 24 sayfalık dergimizi sunuyoruz. İçindeki metinleri okuyarak Esperanto'nuzu geliştirebilirsiniz.

Yaz aylarında herkes yazlıklarda ve tatilde olacağından derginin sayfa sayısını bir miktar azaltmayı planlıyoruz. Ayrıca 24 sayfayı doldurmak ve redakte etmek de bayağı zor bir iş. Bu konuda başka Esperantist'lerin de yardımına ihtiyacımız var. Yaz ayı sayıları için 12, diğer aylar için 16 veya 20 sayfanın dergimiz için daha uygun olacağını düşünüyoruz.

Bu sayıda Carlo Minnaja'nı yazdığı belki de Eperantujo'nun en önemli yazarı olan Julio Baghy hakkındaki yazısını yayınlıyoruz. Yazı çok üst düzey dolayısı ile dikkatli ve çok çalışarak okumanız lazım.

Bu sayıda orta seviyedekiler için bir zamanlar İngiliz Esperanto derneğinin yayınladığı "Genç Dedektifler" hikayesini yayınlamaya başladık. Eleştirmenlere göre kitap çok iyi yazılmamış basit kalmış. Anca amacımız dili öğrenmek olduğundan kitabı çok uzun olmayan, 7 konusunu, birer birer yayınlayacağımız bu hikaye dilinizi geliştirmek için yardımcı olacaktır.

Dilbilgisi kısmında "akuzatif" konusunu üçüncü ve son kısmı ile bitiriyoruz. Her üç kısmı baştan okuyarak akuzatifin nasıl kullanıldığı hakkındaki bilginizi yenileyin lütfen.

Herkese iyi okumalar...

TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavo	2
Kursoj	2
Esperanto-Sumoo	3
Novaĵoj el UEA	3
Novaĵoj el Tejo	3
Majo (legaĵo-humoraĵo)	4
Leterojn ni ricevis	5
Poezio de Gafur Gazizi	5
La junaj Detektivoj (ĉap 1)	6
La Eta Princo (elŝutu kaj legu)	7
Ŝercoj	8
Krucvort-Enigmo	8
Libro Kritiko	9
Mallonga Historio de Filozofio	11
Testudo kun fluto (legaĵo)	12
Kuiru kun mi	13
El la fantazia mondo de Konuralp	14
Nova Esperanto-kurso por poŝtelefonoj	15
Nia trezoro Julio Baghy, homo homa	16
Opinio-Lingva Egaleco	18
Gramatiko	18
La ŝuetoj de la reĝidino (legaĵo)	20
Opinio-Kial Esperanto ne povis disvastiĝi tra la tuta mondo?	21
Esperanto Kurso 6	22
Malfermo	24

Kursoj



1) Kurso por komencantoj en Kadıköy distrikto.

La kurson gvidas Vasil Kadifeli. Ni preskaŭ estas en la fino de la libro "Esperanto per Rekta Metodo". La libron ni finis kaj nun ni legas fabelojn de Grimm fratoj.

2) Kurso por komencantoj en la lernejo Üsküdar Amerikan Lisesi en Istanbul.

La kurso daŭras sukcese kaj la gvidanto estas Murat Özdizdar.

3) Kurso por komencantoj en Celal Bayar Universitato en Manisa urbo.

La kurson gvidas matematisiko Utku Gürdal. Utku sekvas iomete liberan kurs-programon por ke li ne ĝenu la kursanoj. Nuntempe estas la espero, ke eble lernantoj de la antaŭa lerneja-periodo kiuj forlasis la kurson por diversaj kialoj, denove aliĝos. Do eble la kurso havos preskaŭ 30 interesiĝantojn, kaj tiio estos grava sukceso .

Tamen somero alvenas kaj multaj homoj ferios aŭ loĝos en siaj someraj domoj, do la kursoj ekde la fino de majo haltos kaj espereble rekomenciĝos oktobre.



Esperanto Odüllü Yarışma 7 Mayıs - 29 Mayıs
Esperanta Konkurso 7a - 29a de majo

"Esperanto - Uluslararası tarafsız ve Adil Dil"

sayfasındaki 1000. beğeniyi kutlamak adına, yapılan yarışmada katılımcılara Esperanto forma ödülü hediye edilecek. Yarışmaya katılma için sadece bu gruba üye olma yeterli:

<https://www.facebook.com/groups/132668683810260/>

Yarışmanın Ödülü iki kişiye, tişört olarak da kullanılabilir kişiye özel Esperanto forması olacaktır.

Forma Dünya Esperanto Futbol Federasyonu'nun (Tutmonda Esperanto Futbola Asocio - TEFA) lisanslı formasıdır ve kazananın adı, forma numarası ve bedene uygun olarak üretilip ve ücretsiz olarak evinize gönderilecektir.

Utku Gürdal arkadaşımız tarafındaz organize edilen yarışmanın zonuçlarını önümüzdeki ay yayınlayacağız.

Ni atendas leterojn de geamikojn



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

Esperanto-Sumoo



En la maja Sumoo partoprenis entute 274 esperantistoj el 26 landoj. En la marta Sumoo tiuj nombroj

estis 248/26 kaj en la januara 277/29 (la plej altaj nombroj en la tuta Sumoo historio).

La unuaj 10 landoj en la listo estis:

1. Japanio: 63 partoprenantoj
2. Koreio: 42
3. Francio: 37
4. Brazilo: 17
5. Pollando: 15
6. Vjetnamio: 14
7. Svisujo: 12
8. Rusio: 10
9. Barato: 8
10. Nepalo: 7

El Turkujo partoprenis kvin homoj kaj tio estis la plej alta nombro en nia Sumoo historio: **Vasil**

KADIFELI, Fatih Emre CAN, Mehmet Fatih YÜCE, Erol METE, Neriman METE.

Tamen ni havas pli grandan potencon, ekzemple pasintaj luktistoj **Konuralp SUNAL, Utila WU, Ba Jingke, Utku Gürdal** ne partoprenis en la maja Sumoo.

La julia Sumoo : en julio kutime okazas diversaj aranĝoj en Esperantujo, do la julia Sumoo okazos nur por ok tagoj, ekde la 3-a ĝis la 10-a de julio.

UEA



MESAĜO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO OKAZE DE LA INTERNACIA

TAGO DE FAMILIOJ

Gazetaraj Komunikoj de UEA N-ro 612
La 15-a de majo estas proklamita de Unuiĝintaj Nacioj kiel Internacia Tago de Familioj, kies ĉi-jara temo estas "Familioj, sanaj vivoj kaj daŭripova estonteco." Nome de la miloj da Esperanto-parolantaj familioj, kiujn ĝi bonvenigis inter si tra la jaroj, Universala Esperanto-Asocio esprimas sian daŭran sindediĉon al tiuj idealoj, inkluzive de la tri aspektoj ĉi-jare emfazataj: (1) La sano kaj bonfarto de infanoj kaj junuloj, (2) Ekvilibro inter laboro kaj familio kaj la rezultaj sanefikoj, kaj (3) Pli alta vivokvalito por pli aĝaj personoj.

Ekde sia fondiĝo en 1908, nia Asocio laboras por transponti la dividojn inter homoj kaj nacioj. Ne malofte, tiuj agadoj kondukas al internaciaj geedziĝoj kaj la starigo de familioj kies infanoj ĉehejmas en pli ol unu kulturo. Antaŭ cent jaroj, meze de la Unua Mondmilito, la juna Asocio laboris, el sia sidejo en la neŭtrala Svislando, por utiligi la Internacian Lingvon Esperanto kiel ilon por reunuigi familiojn dividitajn de la milito, kaj por starigi kontakton kun familianoj izolitaj de siaj parencoj.

En pacaj periodoj, ni celis disvastigi la lernadon kaj

instruadon de Esperanto kiel vojon por malfermi la mondon al infanoj, plenkreskuloj kaj pliaĝuloj egale; al ĉiuspecaj familioj, ĝi reprezentas unikan manieron por partopreni en internacia komunumo ligita per vojaĝado, literaturo kaj aliaj komunaj spertoj. Hodiaŭ la Asocio organizas ĉiujaran tutmondan renkontiĝon de Esperanto-parolantaj infanoj, kaj niaj aliĝintaj asocioj en pluraj landoj aranĝas ĉiujare kunvenojn de Esperanto-parolantaj familioj.

En la hodiaŭa tago, en mondo kie multe tro da familioj estas dividitaj aŭ dislokitaj de milito kaj politika subpremo, kie multe tro da familioj vivas en malriĉeco aŭ sub minaco de malsano, kie multe tro da familioj vane serĉas ekvilibron inter laboro kaj familio, ni esprimas nian firman deziron, nome de ĉiuj parolantoj de Esperanto, labori por pli sana, pli egaleca, pli tolerema kaj pli paca mondo en kiu la familia vivo estu plifortigita en maniero kiu avantaĝas ĉiujn familiojn kaj ĉiujn individuajn familianojn.

AFRIKA KONGRESO DE ESPERANTO

Gazetaraj Komunikoj de UEA N-ro 612
La sesan fojon Afriko sin preparas por celebri la plej gravan eron de sia agado, nome la Afrikan Kongreson de Esperanto. Tiu tutkontinenta renkontiĝo gastos en la norda tanzania urbo Bunda, de la 24-a ĝis la 31-a de decembro 2016.

TEJO



TEJO-AKTUALE NE PLU LEGEBLA RETEJE

Numero 424

Karaj legantoj, Ekde numero 424, TEJO-aktuale estis dissendiĝas per alia sistemo kaj tial ne plu aperas sur la retejo de UEA.

Danke al la laboro de Joop Kieft, la datumoj de niaj abonantoj estis sukcese transigitaj al la nova sistemo, tamen povas esti, ke via retadreso perdiĝis. Se vi ne plu ricevas TEJO-aktuale aŭ ŝatus ekaboni ĝin, bonvolu tiucele uzi la provizoran abonformularon ĉe: http://eepurl.com/bSI_3r.



Majo

— Pardonon! Ĉu via sinjora moŝto nun alvenis?
— Nun. Brrr.

— Iom malvarme estas komence, ĉu ne? Ho, oni alkutimiĝas. Ĉu oni metis glacian ankaŭ sur vian kapon?

— Oni metis. Brrr.

— Certe, certe! Estas tre bone. Kaj kompreneble oni tute enŝovis vin, ĉu ne? Kioman numeron havas via sinjora moŝto ?

— Kioman numeron?

— Do, ĉu vi ne rigardis ĝin ? Oni ja ligis sur viajn piedojn bileton kun numero kaj kun la nomo, se ĝi ekzistas. Mi havas nur numeron, nomon mi ne havas. Oni ankoraŭ ne rekonis min. Ĉu via ĉelo ne estas mallarĝa al vi ?

— Ne.

— Al mi jes, ĉar mi estas ŝvelbloviĝinta, oni elakvigis min nur post kvar tagoj. Sed tio ne domaĝas, nur mia okulo ĝenas min. Ĝi fluis en mian buŝon. Ĉu vi havas ankoraŭ okulojn ?

— Nur unu. La alian detruis la kuglo. Ĉi tie ĝi eliĝis.

— Ĉu vi per revolvero . . . ?

— Per pistolo.

— Tio estas bone. Unue ankaŭ mi volis tiel, sed poste mi ne povis akiri monon por ĝi. Ĉe mi daŭris longe, sed bonvolu scii, ke kio estas certa, tio estas certa.

— De kie al vi plaĉis . . . ?

— De la fervoja ponto. Sciu, mi povis suprenveni nur post kvar tagoj. La homa pulmo estas abomena. Pardonu, ĉu via ventro jam verdiĝis?

— Ne ankoraŭ. Ĉu ĝi do verdiĝos?

— Ho, se vi nur povus vidi la mian. Ĝi estas preskaŭ tute heleverda, tute ĝis mia umbiliko. Nur mia graso estas bele blua. Iras nun jam ĉio en ordo, ĝis la sekciado; se mi nur jam estus post ĝi. Srrr. Srrr."

— Kion vi faras?

— Nenion, la akvo klukas en mi; jen ankaŭ mia dua okulo elfluis. Mi bedaŭras. Sinjoro la doktoro diris, ke cetere mi estas tute normala. Vere, bonvolu diri, ĉu ŝi

estis blonda?

— Ne, bruna. Kaj ĉu la via?

— Ankaŭ la mia.

— Kiel oni nomis ŝin?

— Jonjo Etega.

— Tiel, ti-i-i-el? Tiukaze vi do estas Zoltano Aĉuly?

— Nu, kaj?

— Kaj mi azeno opiniis, ke ŝi edziniĝis kun vi.

— Ĉu vi do estas Ludoviko Bovicky? Kaj mi opiniis, ke ŝi estas la via. Ĉu mi bezonis do salti de la fervoja ponto?

— Kaj ĉu mi devis elspezi monon por pistolo?

Frenezo!

— Sed tiamaniere ŝi estus ja edziniĝinta kun mi. Se tion mi estus sciinta, ke ŝi ne volas esti la via kaj ke vi saltis de la fervoja... Sed ŝi diris al mi, ke ŝi edziniĝos kun iu alia kaj mi estis sciinta, ke tiu povas esti nur vi...

— Kaj se mi estus sciinta, ke vi aĉetos pistolon kaj, ke ŝi ne estos la via... Sed ŝi diris al mi, ke ŝi edziniĝos kun alia, kaj mi sciis, ke tiu estas vi...

— Kaj pro tio ni ambaŭ ĉi tie disfalis. Kun kiu do Jonjo Etega edziniĝis?

(Viro el la tria ĉelo):

— Kun mi.

Frederiko Karinthy
Tradukis Paŭlo Balkányi

NOTO: Ŝajne laŭ intenco de la aŭtoro komence la leganto tute ne komprenas, kio okazas en ĉi tiu humoraĵo ? Por tiuj, kiuj eĉ nun ne komprenus ĝin, estu klarigata: ĝi estas interparolado de du sinmortigintoj en ĉeloj de domo por mortintoj.

FONTO: Karinthy, Frigyes. "Majo," trad. Paulo Balkányi, en Bonhumoraj rakontoj de nuntempaj verkistoj (Budapest: Markovits kaj Garai, 1921), p. 13-15.

http://autodidactproject.org/other/karinthy_majo.html

Vortareto

		domaĝi	yazık etmek	graso	yağ
		elakvigi	sudan çıkarmak	heleverda	açık yeşil
abomena	iğrenç	elflui	dışarı akmak	humoraĵo	mizah
akiri	elde atmek	elspezi	harcamak	intenco	niyet
ĉelo	hücre	enŝovi	içeri itelemek	kluki	gıdıklamak
detrui	parçalayıp yok etmek	fervojo	demiryolu	kuglo	kurşun
disfali	sağa sola düşmek	frenezo	çılgınlık	ligi	bağlamak

>>>

Leterojn ni ricevis el geamikoj



Saluton,

Biciklado estas sana afero.



Mi rememoras, ke kiam mi estis infano mi havis bicikleton. Por mi ĝi estis blua kiel la ĉielo, rapida kiel la vento..

Tiam ni loĝis en urbeto, kiun oni povas nomi ĝin vilaĝego. Mi ŝatis bicikli sur stratoj, dum horoj. Tio biciklamo kaŭzis multajn akcidentojn, kompreneble. Tamen ne gravis por mi. Poste ni translokiĝis al urbo. Kiam ni devis lasi la bicikleton tie, kun promeso de mia patro pri nova biciklo, tiam mi multe bedaŭris.

Jen post multaj jaroj, mi estas universitata studento en alia urbo. Mi studas je kvara grado. Ĝis antaŭ

kelkaj tagoj, mi ne vere pensis pri aĉeto de biciklo. Sed iam naskiĝis en mi surprize la emon aĉeti biciklon. Mi serĉis en lokaj grupoj ĉe Facebook kaj trovis bonan biciklon. Ĉi-tiu ankaŭ estas blua, tamen ne blua kiel la ĉielo. Ĝi ankaŭ estas rapida tamen ne tiel rapida, kiel la biciklo iam estis.

Biciklado ja estas sana afero. Ne estas bruoj, ne estas poluadoj ktp...

Jen kelkaj bonaj avantaĝoj de biciklado:

- Vi ne devas iri al gimnastikejo
- Vi povas kunporti kun vi librojn kaj florojn
- Ne estas la problemo de parkado
- ktp.

-Bonan Bicikladon al ĉiuj-

Fatih Emre Can (1995)

Poezio de Gafur Gazizi

ALIAN MONDON

Kun via animo mistera, lontana,
min ligas fadeno de sento tenera
kaj kuras laŭ ĝi el la koro infana
kurento de mia animo sincera.



Mi skribas al vi la leteron kun ĝojo
ne nur por saluti vin per bona vorto,
sed por inter ni estu ĉiam la vojo
sur ponto liganta la bordon kun bordo.

Mi volas ke nin en la mondo sensenta
kunigu parolo de l' koro al l' koro.
Ne venu al ni la soleco turmenta,
ne ronĝu estinta aŭ nova doloro...

Kun vi, mia kara amiko lontana,
deziras mi loĝi la mondon unikan,
kreitan de mia imago infana,
kaj ĝui en ĝi la feliĉon amikan.

Fonto: Mirmekobo revuo #2 (Junio 2008)

SE MALPROKSIMAS VI...

Kiam venos nokto milda
vi el hejmo iru al
'ustro de l' mister' aminda
en la kosma ĝeneral'.

Iru vi en kampon vastan
kaj sub stela simfoni'
aŭdu mian voĉon gastan
en ventspira emoci'.

Kaj komprenu amkonfeson
en muzika nokt-silent'
kaj konsciu la neceson
plen-sinceri al la vent' ;

Kaj eldiru ĉion karan,
ĉion koran el l' anim' –
l' vento rompos dison baran
kaj kunigos ambaŭ nin.



Fonto: Mirmekobo revuo #2 (Junio 2008)

pistolo	tabanca	sinjora moŝto	haŝmetmaap
ponto	havuz	sinmortiginto	intihar eden kiŝi
pulmo	akciĝer	ŝvelbloviginta	ŝiŝirilmŝ
rekoni	tanimak	tiamaniere	bu ŝekilde
revolvero	tŭfek	umbiliko	gŭnek deliĝi
sekciado	seksyon, kesik	ventro	karin





"Ĉi libreto laŭ antaŭparolo estas destinita al 13-14 jaruloj... Tamen la rakonto estas sufiĉe mallerte farita... Ĝi plejparte estas tro naiva, evidenta, malrealisma kaj banala... Ankaŭ la lingvaĵo de ĉi verko estas iom malkontentiga. Ne temas pri gravaj mankoj, sed eraretoj kaj malkonvenaj detaloj. Entute temas pri provo ne tre sukcesa en ĝenro preskaŭ tute neglektata de la Esperanta literaturo..."

Tiu estas reĉenzo de Sten Jonasson en la libroservo katalogo de UEA.

<http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=5644&id=529&recenzo=montru#ek>

Tamen ĝi estas mallonga romano de 7 ĉapitroj kaj tre taŭga por esti legata de mezniveluloj. Do ni publikigos unu ĉapitron ĉiu monate ekde la junia numero de nia revueto.

Bonan legadon...

La Junaj Detektivoj - Ĉapitro 1

Mez-nivela

La farmdomo de s-ro Konrado Parano staris inter la malgranda vilaĝo Montoverda kaj la landlimo, kaj ĉe la fenestro de dormĉambro, en varma tago en Aŭgusto, sidis knabo dektrijara. Li estis Andreo Trentano, Nevo de la farmisto, kaj tie, post la tagmanĝo, li sidis, rigardis la kampojn kaj montetojn, kaj revis.

Tie, li pensis, malpli ol du kilometrojn for, estas la rivero, kaj ĉe la alia flanko de la rivero estas Karenlando. Se oni promenas apud la rivero, oni ofte renkontas la gardistojn, kiuj marŝas laŭ la riverbordo por gardi kontraŭ kontrabandistoj, kiuj volas iri aŭ veni trans la riveron.

Andreo estis normala, sana knabo, kaj li ofte pensis pri la kontrabandistoj. Li legis librojn kaj rakontojn pri la antaŭaj tempoj kaj imagis, ke li mem estas gardisto, kiu kaptas faman kontrabandiston kaj gajnas grandan rekompencan. Sed li supozis, ke tiaj aferoj ne okazas en la modernaj tagoj, kaj kiam li pensis pri la gardistoj, kiuj ĉiam marŝas laŭ la riverbordo, li komprenis, ke oni devas esti tre kuraĝa kaj tre kapabla por transiri la riveron sen kapti.

Dum li revis, la pordo malfermiĝis, kaj lia ĝemela fratino Lizbeta envenis.

"Hej, maldiligentulo," ŝi kriis, "kial vi restas en la domo je tia bela tago? Ĉu vi volas veni el la domo, kaj promeni en la kampoj?"

"Ni iru al la rivero, Andreo," proponis Lizbeta. "Eble vi vidos unu el viaj amataj kontrabandistoj."

Post momento ŝi reparolis.

"Kaj kiu diris al vi, ke ili ne ekzistas nun?" ŝi demandis. "Se ne ekzistus kontrabandistoj, la gardistoj ne marŝus laŭ la riverbordo."

Estis paŭzo, dum Andreo pensis pri tio.

"Jes," li respondis, "tio estas vera. Sed certe ili ne povas transiri la riveron, ĉar se persono transirus la riveron, la gardistoj facile kaptus lin."

Andreo kaj Lizbeta daŭrigis la promenon, kaj baldaŭ ili vidis unu el la gardistoj, kiu ĵus turniĝis apud la akvofalo, kaj nun remarŝis laŭ la bordo de la rivero. Kiam li vidis la ĝemelojn li haltis kaj ridetis amike.

"Bonan tagon," li diris. "Kiel iras la vivo ĉe la farmdomo? Ĉu vi estas feliĉaj en Montoverda?"

"Dankon, yes," respondis Lizbeta. "Ĝi estas bona loko. Ni amas la komparon. Se Patro nur estus kun ni ..."

La patrino de la du infanoj estis mortinta kaj ilia patro laboris en la malproksima ĉefurbo. Andreo kaj Lizbeta ne povis loĝi tie kun li, ĉar li multe vojaĝis, kaj li sendis ilin al Montoverda por loĝi kun onklo Konrado kaj onklinio Maria. Tie, de tempo al tempo, li vizitis ilin, kaj la gefratoj multe ĝuis la vizitojn. Konrado Parano ne estis ilia vera onklo, sed ilia patro konis lin dum multaj jaroj, kaj kiam la patrino mortis, la farmisto konsentis ricevi ilin. Ili iris al la vilaĝa lernejo, sed nun estis la ferioj kaj ili estis liberaj.

Kiam ili lasis la gardiston, la geknaboj malrapide repromenis al la farmdomo, kaj parolis pri la patro. Kiam ili venis al loko kie ili povis vidi la domon, Lizbeta subite metis la manon sur la brakon de Andreo.

“Rigardu,” ŝi diris. “Jen tiu aŭtomobilo denove. Tio estas stranga afero.”

“Kial stranga?” demandis ŝia frato. “Ĝi apartenas al komerca amiko de onklo Konrado. Kiam li venas por vidi Onklon, nature la aŭtomobilo venas ankaŭ.”

“Stultulo! Ne estas la aŭtomobilo kiu estas stranga. Sed ĉu vi ne rimarkis, kio okazas kiam ĝi venas?”

“Ne,” diris Andreo. “Mi ne rimarkis, ion neordinaran. La viro eniras en la oficejon de la onklo, kaj poste elvenas kaj foriras.”

“Ŝ—ŝ—ŝ,” flustris Lizbeta, dum ili pasis la aŭtomobilon, kaj ili eniris kune. “Venu al la fenestro kaj rigardu.”

Ili eniris la manĝoĉambron, sidiĝis apud la fenestro, kaj atendis. Baldaŭ ili aŭdis paŝojn, kaj post unu-du momentoj ili vidis la onklon kaj la vizitanton. La vizitanto portis grandan pakaĵon, kiun li metis en la aŭtomobilon. Tiam li mem eniris, adiaŭis la farmiston kaj forveturis.

“Jen,” flustris Lizbeta. “Ĉu vi vidis?”

“Kion? Mi ne vidis ion strangan.”

“Ho, vi!” respondis la knabino senpacience. “Vi revas

pri la kapto de kontrabandistoj; vi neniam kaptus eĉ muson! Ĉu vi ne vidis la grandan pakaĵon, kiun la viro portis?”

Andreo ne komprenis.

“Ĉu ĝi estis speciala pakaĵo?”

“Ne ...,” diris Lizbeta. “Sed ĉiam li portas similan pakaĵon, kiam li foriras. Kaj ĝi venas el la kelo!”

“El la kelo!” Nun Andreo vere surpriziĝis. La kelo estis ĉiam ŝlosita, kaj oni ne permesis, ke la ĝemalaj eniru. Kio povas esti en la pakaĵoj, kiujn la stranga vizitanto ĉiam forportas el la kelo? Jen vera mistero.

“Eble li estas kontrabandisto,” diris Andreo, kaj liaj okuloj brilis. “Do, ni devas esti detektivoj, kaj kapti lin. Vi diras, ke li ĉiam forportas similan pakaĵon, kiu venas el la kelo. Li portas nenion, kiam li venas. Ni neniam vidas la onklon meti ion en la kelon, kaj ĝi estas ĉiam ŝlosita. Tio ja estas stranga afero! Sed, se li estas kontrabandisto, kiel ni povas kapti lin?”

“Unue,” respondis Lizbeta, “ni devas teni la okulojn nefermitaj. Eble ni vidos la onklon meti pakaĵon en la kelon, aŭ eble ni povos trovi la ŝlosilon kaj serĉi en la kelo. Kaj due, ni devas teni la orelojn nefermitaj, kaj eble ni aŭdos ion, kio klarigos la aferon.”

Andreo konsentis, kaj tiel komenciĝis la Afero de la Misteraj Pakaĵoj. La junaj detektivoj ridetis silente unu al la alia, kaj je tiu momento onklino Maria envenis kun la vespermanĝo.

(daŭrigota)

La Eta Princo - elŝutu kaj legu ĝin



“ĜI ESTIS NUR VULPO
SIMILA AL CENT MIL ALIAJ.
SED ĜI FARIĜIS MIA AMIKO
KAJ ĜI NUN ESTAS UNIKA
EN LA MONDO.”

(LA ETA PRINCO)

La Eta Princo estis unue publikigita en la jaro 1943 en la franca. Ĝia verkisto estas la franca aviadilisto

la libron el :

<https://www.facebook.com/groups/librejo/229682273814248/>

Vi ankaŭ povas legi ĝin surrete, kaj legante vi povas trovi la signifojn de nekonataj vortoj klakante sur ili. Sed la signifoj kompreneble estas en la angla lingvo: http://www.libraro.net/read/antoine_de_saint_exup%C3%A9ry/la_eta_princo/1/

Antoine de Saint-Exupéry. Li verkis la libron dum sia resto en "The Bevin House" hotelo en Long Island.

Ĝi estas unu el la plej venditaj libroj en la mondo. Pli ol 80 milionoj da ekzempleroj en multaj lingvoj estis venditaj. La desgenojn desegnis la verkisto mem. Oni faris animacian filmeton el ĝi kaj ĝi estis enscenigita multfoje en multaj landoj sur la mondo. Vi povas elŝuti

Ekzistas ankaŭ sondosiero farita de koreano Masoris Karam Kim sed lia pronoco povas esti iomete stranga por vi. Tamen Masoris ja faris bonan laboron. Jen la ligilo:

https://www.youtube.com/watch?v=yGS_uCAAwSQ

Ŝercoj



Tri iomete stultaj kandidatoj volas fariĝi policanoj. La unuan kandidaton ekzamenas veterana detektivo, kiu montras al li foton kaj demandas:

— Vidinte la foton de ĉi tiu suspektato, ĉu vi nun kapablas rekoni tiun ĉi homon, kiam vi renkontus lin?

— Nepre, s-ro detektivo. Ja estus tre facile, ĉar li havas nur unu okulon.

La detektivo koleriĝas:

— Ne, stultulo! Vi vidas lian profilon! Foriru tuj!

Li alvokas la duan kandidaton:

— Rigardu ĉi tiun foton zorge. Ĉu vi kapablas rekoni tiun ĉi personon meze de homamaso?

— Sendube, s-ro detektivo. Ne estus problemo, ĉar temas pri malofta kazo: unuorela homo.

La detektivo ankoraŭ pli koleriĝas kaj forpelas la kandidaton. Jam senespere li alvokas la trian, kaj faras la saman demandon. La respondo nun estas:

— Jes, s-ro detektivo, mi tuj rekonis lin. Kaj mi aldonas, ke ĉi tiu homo portas kontaktolensojn. Surprizite, la detektivo supozas, ke la kandidato volas ridindigi lin. Li konsultas siajn dosierojn, kaj ili konfirmas, ke la suspektato ja uzas kontaktolensojn. Konfuzite, li demandas:

— Kiel vi eksciis, ke ĉi tiu homo uzas kontaktolensojn?

— Nu, iom da deduktado, s-ro detektivo. Ĉar li ne kapablas uzi okulvitrojn, li estas devigata uzi kontaktolensojn.

Ankoraŭ pli konfuzite, la detektivo redemandas:

— Sed kial li ne kapablas uzi okulvitrojn?!

— Tre elementa fakto, s-ro detektivo. Kiel li povus uzi okulvitrojn, se li havas nur unu okulon kaj nur unu orelon?



Krucvort-Enigmo



Horizontale

1. En logika, sinsekva maniero;
2. Mallongigo de "aplikaĵo";
3. Ekvidi, trafi tion, kion oni serĉas; Averta sono, informanta pri minaca danĝero;

oni serĉas; Averta sono, informanta pri minaca danĝero;

4. Organo de la vidkapablo (pluralo);

5. Speco de haroj formanta la felon de ŝafoj;

6. Volvegrimpa herboj kies tre diversformaj, ofte tre grandaj, karnaj fruktoj estas uzataj nematuraj kiel legomo, aŭ maturaj por ornamaj celoj;

7. La kvara tono en la relativa solfeĝo;

Prepozicio signifanta "koncerne al, rilate al, teme de";

8. Antaŭe ne ekzistanta, aŭ ne konata, aŭ ne spertita; Dezerto en C-Azio, dividita inter Mongolujo kaj Ĉinujo;

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1												
2												
3												
4												
5												
6												
7												
8												
9												
10												
11												
12												

10. Loko, destinita por lernado; Aro de ok aferoj aŭ personoj;
11. Surkapa ornamaĵo, kun multekostaj ŝtonoj, portata kiel signo de suvereneco aŭ nobeleco;
12. Konstruaĵo, ebliganta transiron super rivero, fosaĵo, alia vojo ks;

Vertikale

1. Tero, polvo, miksitaj kun akvo, sur strato, vojo ks; La granda rivero de Egiptio;
2. Speco de granda birdo el la ordo de strigoformaj, fam. de strigedoj, kun granda plumtufo super ĉiu okulo;
3. Natura profunda subtera kavo;
4. Speco de birdoj el la ordo de galinoformaj, kies virbesto povas ventumilforme etendi sian belkoloran voston, kovritan de brilaj, okulformaj makuloj;
5. Helena filozofo (341—270), kies plej fama disĉiplo estas Lukrecio kaj ankaŭ temo de ci-tiu revueto;
6. Konsonanto, voĉa nazala dentalo; Ago de iu, kiu gajnas;
7. Enĉambra litniĉo, kelkafoje fermebla per kurteno aŭ pordo;
8. Plezurkunveno, en kiu viroj k virinoj dancas kune;
9. Speco. de aliumo, plurjara legomo kun specifaodoro kaj gusto, kun folioj similaj al la poreaj kaj kun akragusta bulbo; uzata por spicado kaj medicino; Elemento, Au;
10. Doma dikhaŭta mamulo el la ordo de parhufuloj kaj kiun oni grasigas por homa nutrado;
11. Pronomo, signifanta «iu ne menciita persono»;

(La solvo troviĝas en la lasta paĝo)

Libro Kritiko

KAVALIRO EN TIGRA FELO

"Kavaliro en tigra felo" estas traduko de famega eposo verkita en la 12-a jarcento de la kartvela poeto Ŝota Rustaveli. Estas interese, ke la tradukisto uzis esprimon tigra felo, kvankam historie pli ĝuste estus uzi pantera felo. La eposon tradukis Esperanten Zurab Makaŝvili kaj la unua eldono de la Esperanta libro estis en 1989.



Reĉenzo de Kartvelologo Joakim ENWALL (Stokholmo, Svedio):

"Kavaliro en tigra felo - la pli grandan priferindaĵon de la kartvela popolo, mi ekkonis unue en Tbiliso, la ĉefurbo de Kartvelio. Tiu fakto mem evidentigas, kio mankas. Malgraŭ la multnombraj fremdlingvaj tradukoj, tiu, enhance, kaj eble eĉ pli, forme, elstara epopeo de la 12 jarcento [de] kartvela poeto Ŝota RUSTAVELI ne atingis multajn eksterlandajn legantojn, almenaŭ ne laŭ ĝia merito. Laŭ mi, [pro] unuavice lingvaj barieroj, ĉar kvankam multnombraj,

granda parto el la tradukoj ne estas tre altnivela; ili ne respeguligas la formon kaj enhavon de Rustaveli. Alia kaŭzo povas esti la relativa neglekto pri orientlandaj literaturoj en la literaturscienco.

Kavaliro en tigra felo estas interesa el multaj vidpunktoj, eble precipe kiel sintezo de okcidenta kaj orienta kulturoj. Grandan influon sur la enhavo havis la antik[va] greka filozofio (laŭdire Rustaveli studis filozofion en Bizancio) kaj sur la formo, antaŭ ĉio, persa kaj araba mezepoka literaturo, kies simboloj kaj metaforoj tre oftas en la poemo.

La epopeo de Rustaveli ludas multe pli aktivan rolon en la kartvela vivo ol kutime mezepokaj verkoj. La kartveloj ofte konas longajn partojn parkere kaj ĝi estas ĝenerale konsiderata kiel enhavanta ĉiujn naciajn trajtojn de la kartvela popolo.

La traduko de la tuta poemo far sinjoro Zurab MAKASVILI, el multaj vidpunktoj superas al diversaj nacilingvaj tradukoj, konservante kaj la enhavon kaj la formon.

Mi tre ĝojas, ke la esperantistaro nun havas la eblecon ekkoni ĉi-tiun vere atentemeritan kaj belan tradukon, kaj mi kredas, ke sinjoro Zurab MAKASVILI vane ne laboris."

Ruslingvan enkondukon verkis Georgij KOROTKEVIĈ, estrarano de Asocio de Sovetaj Esperantistoj (Moskvo).

"HEROOJ DE RUSTAVELI PAROLAS EN ESPERANTO

Rimarkinda poemo - Kavaliro en tigra felo estas ne nur kolorriĉa beletraĵo de kartvela poeto de la 12-a jarcento Ŝota RUSTAVELI, tio estas enkorpiĝo de vivkonfirmantaj, tuthomaraj ideoj de humanismo, alta amo kaj solidareco de popoloj.

Prikantante la plej bonajn kavalirajn kvalitojn, la mezepoka poeto kreis unikajn figurojn kaj karakterizojn de homoj, pasie amantaj en libereco, vivo kaj justeco.

Herooj de Rustaveli estas homoj de diversaj naciecoj: araboj, hindusoj, ĉinoj, persoj kaj aliaj. En unu loko oni mencias rusojn kaj francojn. Ilia interkompreniĝo simbole determinas amikecon de popoloj, tiom plensange enirinta en nian hodiaŭan vivon. [La vortojn oni skribis antaŭlonge de disfalo de l'"unuanima familio de popoloj", kiel oni nomis eksan Sovetunion. - NSTj].

Temo de l'poemo estas saturita per dramatikaj kaj foje eĉ tragikaj situacioj, tamen ili estas efemeraj kaj ankaŭ mallong- daŭras ĝuste kiel malbono mem. Herooj de l'poemo sankte kredas al venko de bono kaj dum ilia agado ilia ĉefa orientigilo estas kuraĝo, alta amo, neŝanceblebla amikeco kaj konvinkeco je morgaŭo.

Ĝis nun oni havas ĉ. 60 plenajn tradukojn de l'poemo en diversaj lingvoj de la mondo. Tiu ĉi libro estas traduko [de la poemo] en la lingvo de internacia interkomunikado - Esperanto. La tradukisto - Zurab MAKASĤVILI - konservis ĉefajn trajtojn de l'originalo: saĝegon de l'senco, organizitajn rimojn, kvanton da silaboj en unu linio kaj melodiecon de l'verso."

Fonto:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Kavaliro_en_tigra_felo

Tiun libron mi legis dum pasinta Esperanto-Sumoo ĵus antaŭ la 7-a Mezorianta Kunveno kiu okazis en Tbiliso Kartvelujo. Mi povas diri, ke tamen ne esta poem-amanto mi multe ŝatis la rakonton de Ŝota Rustaveli kaj li tre bone priskribas la etoson de 12-a jarcento en la vasta regiono de Arabujo al orienta Afriko, kaj de

orienta Afriko al Hindujo kaj eĉ al Ĉinujo.

La eposon tradukita de Zurab Makaŝvili kompilis kaj redaktis komputilversion la Kartvela Esperanto Asocio, en la jaro 2013-2014 por la 7-a Mezorianta Kunveno kiu okazis en aprilo 2014 en Tbiliso. Renato Corsetti



Sota Rustaveli

La poemon en Esperant lingvo oni povas legi rete en ĉi tiu ligilo:


http://uea.org/vikio/KAVALIRO_EN_TIGRA_FELO

Se vi volas ĝian pdf formaton mi povas sendi ĝin al vi retpoŝte. Nur sendu al mi vian retpoŝt-adreson.

redaktis la tekston, kaj mia nura kaj modest helpo estis prepari la pdf-dosieron por ke oni printu ĝin facile kiel libro.

Mi ankaŭ partoprenis al tiu Kunveno e Tbiliso kies temo estis Ŝota Rustaveli kaj tiu eposo.

Vasil Kadifeli



Pluaj miniaturoj el la libro troviĝas ĉe:

<https://www.youtube.com/watch?v=4SQ24OKNQI4>



En la jaro 1881 Mihály Zichy, hungara romantika pentristo, kiam li estis en Tbiliso pentris 35 pentraĵojn el kiuj 27 estis uzataj en la nova publikaĵo de la libro.


Mallonga Historio de la Filozofio (6)



Saluton,

En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la mallongan historion de Filozofio kun Epikuro. Epikuro estas filozo kies filozofio estas interesa kaj mi ankaŭ ŝatas kaj kredas. Legu la ĉi suban rakonton pri Epikuro atenteme..

Vasil Kadifeli



Epikuro

"La vojo en ĝardeno"

La greka filozofo Epikuro (AK.341-270) naskiĝis en Samoso insulo. La ĉefa punkto de lia instruado estis: *"timo pri via morto estas nur perdo de tempo por vi"*. Oni ĉiam pensas ke oni spertos morton, ke oni scios ke li estos morta

post morto. Jes, eble la lastaj tagoj de iu suferanta malsanulo certe prezentos malfacilaĵojn kaj eble multan doloron sed la finan punkton, kiu estas la morto mem, li neniam spertos. Epikuro pensis pri la antaŭa tempo de la naskiĝo kaj konstatis, ke neniu timas tiun tempon en kiu oni ne estis vivanta. Do, kial oni timu pri la tempo de sia morto kaj post ĝi, kiam oni ne estos vivanta?

Epikuro instruis al siaj lernantoj ĝui la vivon, havi plezuron, agrablan tempon kaj bonajn memoraĵojn, por ke ili estu feliĉaj kaj poste kiam ili estos malsanaj en la mortolito, ili pensu pri tiuj memoraĵoj kaj tiel malaltigi ilian doloron. Por Epikuro morto kaj vivo estas du apartaj aferoj, kaj vivantoj neniam spertos morton. Do, kial ili timu morton?

Certe vi demandos pri la "animo". Tiuj kiuj kredas ke animo restas kaj "vivas" post la morto ne povas kompreni tiun filozofion. Laŭ tiu filozofio animo kaj vivanta korpo estas la sama afero. Ili kune ekzistas aŭ ne. Por tiuj kiuj timas punon post la morto Epikuro diris kun granda konfido "dioj kiuj kreis la homon tute ne intersiĝas pri li poste, do, ne timu punon." Epikuro bonege resumis sian filozofion sur sia tombŝtono :

*"Se mi ekzistas, ne ekzistas morto;
Se morto ekzistas, mi ne ekzistas"*

Oni povas diri ke tio estas kuracilo por homoj pri vivo kaj morto, kaj multaj filozofoj pensis pri la saman aferon.


Poste oni akuzis Epikuron kaj siajn lernantojn por esti homoj kiuj nur ĝuis la vivon, kiuj manĝis bongustajn ekzotikajn manĝaĵojn, trinkis vinon kaj pensis pri nenio alia ol pasigi bonan tempon kaj sperti plezuron. Sed tio ne estas la vero. Epikuro kaj liaj lernantoj multfoje manĝis nur panon kaj trinkis nur akvon. En Ateno li instruis en domo kiun ĉirkaŭis ĝardeno, kaj pro tio oni moke nomis lian instruadon *"La vojo en ĝardeno"*. En la grupo kiun li instruis ne estis nur viroj, sed ankaŭ virinoj kaj gesklavoj. Tio estis ne kutima afero en la tiama Ateno, do krom liaj lernantoj neniu alia ŝatis Epikuron kaj lian *"ĝardenon"*.

La ĉefa temo de lia filozofio estis havi pli bonan vivon kaj ĝui vivon por ke oni posedu bonajn memoraĵojn kaj oni tiel feliĉiĝu.

Oni diras, ke Epikuro verkis multajn librojn sur papiruson tamen neniu atingis nian tempon. Ni nur scias pri lia instruado el la verkoj de aliaj. En la antikva urbo Herculaneum kiu estas proksime al Vezuvio en la sudo de Pompeio, kaj kiu ankaŭ estis plejparte kovrita per la cindroj de Vezuvio dum la fama erupcio (PK.79) oni poste malkovris kelkajn librojn de Epikuro sub la cindroj. Ni ankaŭ lernis pri Epikuro el la longa poemo "Pri la Naturo" aŭ "Pri la vera eco de la estaĵoj" kiun verkis la romia filozofo kaj poeto Lukrecio cent jarojn post la morto de Epikuro.

Ludwig Wittgenstein, filozo kiu vivis en la 20-a jarcento verkis pri la sama penso de Epikuro en sia libro "Tractatus Logico-Philosophicus". Ludwig ankaŭ diris, ke "neniu spertos morton, ĉar morto ne estas parto de vivo".

(daŭrigota)



TESTUDO KUN FLUTO



Iam apud rivero Testudo ludis fluton. Dum Testudo muzikis ĉiuj bestoj aŭskultis. Leonoj, elefantoj, papilioj, serpentoj kaj simioj dancis en la ritmo de la muziko.

Unu tagon viro aŭdis la muzikon de Testudo. “Ha,” li pensis, “tio estas Testudo kiu ludas. Testudo certe bongustus nun.” Do li vokis “Testudo! Montru al mi vian belan fluton.” Testudo malrapidis ĝis la pordo kaj alte tenis sian fluton. Sed tuj kiam Testudo estis proksima li kaptis ĝin ĉe la kolo kaj ekkuris. Testudo provis krei por ricevi helpon, sed ĝi ne sukcesis ellasi sonon. Ĝi fermis siajn okulojn kaj forte tenis sian fluton por ke ĝi alportu bonŝancon.

Kiam la viro atingis sian dometon, li metis Testudon en kaĝon kaj bone fermis ĝin. Tiam li alparolis siajn infanojn. “Ne lasu Testudon elfuĝi.” Kaj li iris al la kampoj. La infanoj komencis ludi ekstere. Testudo sidis tre kviete en la kaĝo, pensante pri la vortoj de la patro. Ĝi ekludis dolĉan melodion per sia fluto kaj la infanoj kuris al ĝia kaĝo. “Ĉu vere estas vi kiu ludas, Testudo?” ili demandis kun mirplenaj okuloj. “Jes” respondis Testudo. Ĝi daŭrigis ludi, ĉar ĝi vidis ke la infanoj tre ĝuis tion.

Finfine ĝi haltis. “Mi kapablas danci eĉ pli bone ol mi kapablas muziki,” ĝi diris. “Ĉu vi deziras vidi?” “Jes, ni petas!” tuj diris la knabeto. “Mi montros al vi kiel danci kaj muziki samtempe,” diris Testudo, “sed vi devos malfermi la kaĝon. Ne estas sufiĉe da spaco tie-ĉi.” La knabeto do malfermis la kaĝon kaj Testudo komencis danci kaj muziki. La infanoj ridis kaj aplaŭdis ĉar ili ankoraŭ neniam vidis tian belan spektaklon.

Post iom da tempo Testudo haltis. “Ne haltu!” kriis la infanoj. “Ho,” grumblis Testudo, “miaj kruroj estas rigidaj. Se nur mi povus iomete paŝi por malstreĉi ilin...” Ne iru tro malproksimen,” atentigis la knabineto. “Revenu tuj.” “Ne timu,” respondis Testudo. “Atendu min tie-ĉi.” Testudo iris en la direkton de la ĝangalo. Tuj kiam la infanoj ne plu povis vidi ĝin, ĝi ekkuris al sia hejmo.

Neniu iam ajn retrovis Testudon. Sed eĉ nun, se vi tre atente aŭskultas, vi povas aŭdi en la arbaro la dolĉan sonon de fluto.



Fonto: www.Bookbox.com

<https://www.youtube.com/watch?v=MdOonoPixHU>

Vortareto		daŭrigis	devam ettirmek	grumbli	homurdamak
		direkto	yön	halti	durmak
alparoli	birilerine konuşmak	dolĉa	tatlı	kaĝo	kafes
alporti	taşımak	ekludi	çalmaya başlamak	kampo	tarla
alporti bonŝancon	iyi şans getirmek	elefanto	fil	kapabli	becermek
aplaŭdi	alkışlamak	elfuĝi	kaçmak	kolo	boyun
atendi	beklemek	ellasi	dışarı bırakmak	kviete	sessizce
atentigi	dikkati çekmek	ellasi sonon	ses çıkartmak	lasi	bırakmak
atingi	ulaşmak	finfine	en sonunda	leono	aslan
bongusti	nefis olmak	fluto	flüt	malproksime	uzak
bonŝanco	iyi şans	ĝangalo	cangıl	malstreĉi	gevşemek

melodio	melodi	rigida	kati, bükülmejen	spektaklo	gösteri
miro	hayret	ritmo	ritim	teni	tutmak
mirplenaj okuloj	hayretle dolu gözler	samtempe	ayni zamanda	Testudo	kaplumbağa
montri	göstermek	serpento	yılan	tie-çi	burada
papilio	kelebek	simio	maymun	timi	korkmak
pensante	düşünerek	sono	ses		
peti	rica etmek	spaco	alan, yer		

Kuiru kun mi

LASANJOJ KUN KUKURBO

Ingrediencoj (por 4 personoj)

400 gramoj de lasanjoj
 500 gramoj da kukurbo
 cepo
 beŝamelo
 parmezano
 mocarelo fumaĵita
 salo
 supervirga olivoleo



Ni tranĉu la cepon fajne, metu en pato supervirgan olivoleon kaj lasu friti la cepon ĝis kiam estos orizitan. Ni aldonu la kukurbon en pecojn, metu pinĉaĵon da salo kaj kuiru ĝin, premante ĝin per supkulerego, ĝis kiam iĝos kremon (ĉirkaŭ 20 minutojn).

Dume preparu la beŝamelon. Vi devas kunigi la farunon al la fandita butero kaj miksi daŭre. Kiam la kunmetaĵo estos malhela, kunigu iom post iom la lakton, lasu la beŝamelon laŭ fajro malalta ĝis kiam ĝi estos densa. Metu la salon, la nigran pipron kaj la muskaton depende de via gusto.

Ni metu en la rostopato iom de beŝamelo por kuiru pli bone niajn lasanjojn kaj komencu meti la unuan tavolon de lasanjoj kun kukurbo kremo, beŝamelo, mocarelo fumaĵita en pecoj kaj raspita parmezano. Ni ripetu la operacion plurfoje, por pluraj tavoloj. Ni surŝutu la supran tavolon kun beŝamelo, mocarelo kaj parmezano.

Baku ĝin en la forno al 200°C por ĉirkaŭ 20 minutoj, ĝis kiam estos formiĝinta krusto.

Ni servu ĉe la tablo! ^__^

Fonto: <https://kuirukunmi.com/2014/01/30/lasanjoj-kun-kukurbo/>



Vortareto		super virga olivoleo	kunmetaĵo	birlikte konulan ŝey
		süper bakir zeytin	malhela	aĉık renk
lasanjo	lazanya	yaĝı (kaliteli sızma)	fajro malalta	aĉık ateş
kukurbo	kabak	pato	densa	yoĝun, kıvamlı
cepo	soğan	orizitan	muskaton	hint cevizi
beŝamelo	beşamel		rostopato	ızgara tavası
parmezano	parmezan peyniri	pinĉaĵon	tavolo	katman
	(italya)	supkulerego	raspita	ızgara yapılmış
mocarelo fumaĵita	füme mozzarella	farunon	surŝuti	üzerine atmak
	peyniri (italya)	fandita butero	krusto	kabuk
		erimiş tereyağı		

El la fantazia mondo de Konuralp



Var yokmuş yok da yokmuş, azı çoğu bilen yokmuş. Ne gören ne işiten, ne koklayan ne tadan ne de dokunan yokmuş...Dünya bir karanlık yorganmış. Üstünde bir delik açılmış. Bu ilk noktaymış. İlk noktadan ışık saçılmış, biçimler yayılmış, hayatın sonsuz değirmisi dönmeye başlamış. Her dönüş bir gerçeğeysen, bir de sureteymiş. Suret, gerçeğin çeşni katılmışı, masal suretlerin rengahenk toplamı. Öyle masallar getirdim ki size, kocaman bir yumaktan çöze çöze...Dokunursa öze, ne mutlu bize!

Kanatlandırılmazsa düşlerinizi, yetmemiş dersiniz Masalbaz'ın nefesi!

lam la ekzistanto ne ekzistis, kaj ankaŭ la neekzistanto ne ekzistis, ekzistis neniu kiu sciis pri la iomon kaj la troon. Estis neniu vidanto kaj neniu aŭdanto, neniu flaranto kaj neniu gustumanto, kaj eĉ neniu tuŝanto... La mondo estis ia malhela peplomo. Kaj jen truo formiĝis sur ĝi. Tiu estis la unua truo. El la unua truo diskuris lumo, disvastiĝis formaĵoj, kaj tiel la muelilo de la vivo ekrotaciis. Se unu el tiuj rotacioj estis por la vero, la alia estis por la imitaĵo. La imitaĵo estas la gustohavo de la vero, kaj la fabelo estas la tutaĵo de la kolor-harmoniaj imitaĵoj. Mi alportis al vi fabelojn disvolvante ilin el la tuta volvaĵo... Se ili tuŝos la esencon, kia feliĉo por ni! Se ili ne povos flugiligi viajn sonĝojn, vi diros ne sufiĉis la spiro de la Fabelisto, kiu estas mi!

* Tiu fabelo estas ekstrakto el la verko "Fabeloj de Vordonisi" verkita de Konuralp Sunal



Size gelecektekten geldim. Nasil sŝoyseme? Ŝu yaŝadığınız anın milyon yıl sonrasından. Siz benim için geĉmişsiniz, ben sizin için geleceğim. Ama orada, geldiğim gökadamda ve içindeki yıldızlarda

geĉmiş-bugün-gelecek yok... An da yok... Sonsuz oluş var.

Mi alvenis al vi el la estonteco. Kiel mi diru? El punkto miljono da jaroj pli poste ol la tempo vi nun estas vivanta. Vi por mi estas la pasinteco, mi por vi la estonteco. Sed tie, en la galaksio kaj en la steloj de kie mi venis ne ekzistas pasinteco-estanteco-estonteco... Nek ekzistas momento... Nur ekzistas eterna ekzistado.

Sizin zamanınızla bugün, bu akşam, üç kişinin, üç insan formunun masalını anlatmaya geldim. Dünyanın sonu gelmekteyken, dünyadan uzaklaşan ve uzayda başka başka gezegenlere dağılan üç kişinin masalını. Tabii yine de, sizin zaman anlayışınıza, sınırlı sözcüklerinize uydurmaya çalışacağım. Ben bir uzay gemisiyle kaçmıştım bu zalim dünyanızdan, kuraklıktan, selden, kinden, kibirden, açlıktan, savaştan...Kaçamayanlar kaldı oracıkta, kaldı bitki-hayvan-insan...

İyisi mi, es geçeyim yerkürenin sonunu. Çünkü siz de bu gözlemlerinizle göreceğ kadar bir ömür süremezsiniz. Güneşin soğumasını bile gördüm, kendi gökadamdan...Ama boşverin, içiniz kararmanın, masalımız başlasın!

*"Uzayda her gördüğünüz dönüşür
Sönen yıldızla karanlık üşüşür
Her parçacık benzeriyle öpüşür
Boşluk dediğin maddeyle örtüşür"*

Ben bu alemin diliyle, dilim döndüğünce anlatacağım ama siz başka bir kulak başka bir göz başka bir beyin

Mi venis hodiaŭ, ĉi vespere, per via tempo, por rakonti al vi la fabelon de tri personecoj. La fabelon de tri hom-formaĵoj. La fabelon de tri homoj kiuj, kiam estis alvenonta la fino de la mondo, ili forfuĝis kaj disiris al diversajn planedojn en la spaco. Sed tion mi provos rakonti al vi nur per limigitaj vortoj taŭgaj al via kompreno de tempo. Mi per spaco-ŝipo forfuĝis de via kruela mondo, mi forfuĝis de sekeco, inundoj, malamo, aroganteco, malsato kaj militoj... Tiuj, kiuj ne sukcesis forfuĝi, restis ĉi tie, plantoj-bestoj-homoj...

Sed estus pli bone se mi ne rakontus al vi la finon de ĉi tiu mondo. Ĉar vi ne vivos tiom longan vivon, por vidi ĝin per viaj propraj okuloj. Mi eĉ vidis la malvarmiĝon de la suno de mia galaksio. Sed forgesu ĝin, mi ne volas ke viaj koroj ankaŭ malheliĝu, do, nia fabelo komencu!

*"Ĉion kion vi vidas transformiĝas en spaco
La estingiĝantan stelon invadas malheleco
Ĉio ero kisiĝas per ĝia simila ero
Spaco koincidas per substanco"*

Mi per la lingvo de tiu mondo, provos rakonti al vi, sed vi trovu malsimilan orekon, malsimilan okulon, kaj

edinin, söyleyemediklerimi sezgileyin!

malsimilan cerbon por intuicii tion kion mi ne kapablos esprimi!

Unutmadan söyleyeyim, bizim paralel alemde masalbazlara, meddahlara, kıssahanlara vs “Tunktunkpatapunk” derler...70 parsek zaman önce, benim kaçtığım gökadanın yani galaksinin atası olan iki yıldız çarpıştıklarında bu ses çıkmış. Sebebi bu...

Mi tion devas diri al vi antaŭ ol mi forgesos, ke en nia paralela kosmo la fabelistojn, rakontistojn, alegoriistojn ktp oni nomas “Tunktunkpatapunk”... Antaŭ ol tempo de 70 parsekoj, en la galaksio al kiun mi forfuĝis, du pra-steloj koliziis kaj tiu sono ekaŭdiĝis. Jen la kialo...

* **Tiu fabelo estas ekstrakto el la verko “Spacaj Fabeloj” verkita de Konuralp Sunal**

Nova Esperanto-kurso por poŝtelefonoj



Internacia Esperanto-Instituto en Hago lanĉis – post stadio de testado kaj korektado – novan aplikaĵon por lerni Esperanton en la butiko de Googleplay, vidu:

<https://play.google.com/store/apps/details?id=com.embarcadero.esperanto>

Tre konata estas la kurso Esperanto per rekta metodo de Stano Marček. Kvankam la kurso mem nur estas en Esperanto ĝi por diversaj naciaj komunumoj aperis kiel libro kaj kiel kompakta disko kun nacilingvaj klarigoj. Nun ĝi ankaŭ aperis kiel t. n. "apo". (Volumo 1, lecionoj 1 ĝis 11).

Apo (mallongigo de aplikaĵo) estas komputilprogramo por t. n. plurfunkciaj poŝtelefonoj (angle: smartphones). Tia poŝtelefono ne nur estas telefono, sed vera komputilo: per ĝi oni povas telefoni, fari fotojn, trovi la vojon, interreti, tviteri, pririgardi

filmojn, aŭskulti muzikon, ktp., ktp.

Multaj homoj jam havas ĝin. Oni amase vidas ilin surstrate, en trajnoj, en butikoj, en publikaj konstruaĵoj. Patr(in)oj malantaŭ infanĉaroj, gejunuloj sur biciklo, oficistoj en kontoroj, laboristoj en konstruejoj... Kelkfoje ŝajnas kvazaŭ homoj nur komunikas per sia poŝtelefono...

Ekzistas almenaŭ tri specoj de apoj:

- 1) apoj kiuj (nur) funkcias en telefonoj de Apple (i.a. I-phone),
- 2) apoj kiuj (nur) funkcias en Android telefonoj (i.a. Samsung),
- 3) apoj kiuj (nur) funkcias en Windows telefonoj (i.a. Nokia).

Oni nur povas elŝuti (akiri) kaj instali apojn per la butikoj de tiuj firmaoj: Android-apoj nur per la apobutiko de Google.



Por Apple estas konata la apo Duolingo: por multaj lingvoj ĝi havas lingvan lernilon, nun ankaŭ en Esperanto. Estas ĝoje ke nun ankaŭ aperis Esperantokurso kiel apo por Android. Ĝi estas vera kurso, nome surbaze de la materialo de Esperanto per rekta metodo. Piet Buijnsters, la programisto, uzis por ĝi la tre trafajn kaj instruajn bildojn (desegnaĵojn) de Linda Marčekova el la kursolibro, kaj kiam oni klakas aŭ tuŝas la tekstojn de la kurso oni ankaŭ tuj povas aŭdi la klaran prononcadon. En ĝi ankaŭ estas la ekzercoj kaj taskoj de la libro.

La apo rigore sekvas la taŭgan, metotan instrulinion de la kurso, sed kompreneble oni povas mem elekti sinsekvon kaj rapidon, ĉar granda profito de la kurso kiel apo estas ke tiuj kiuj havas plurfunkcian poŝtelefonon laŭ ŝato kaj en diversaj cirkonstancoj povas uzi ĝin kaj lerni Esperanton: kiam oni veturas en trajno, kiam oni devas ie atendi, preskaŭ ĉie ajn kaj ĉiam ajn...

La apo ankoraŭ estas senpaga. Por elŝuti kaj instali ĝin: iru per via poŝtelefono al la Google-apo-butiko (Google Play) kaj trovu ĝin per la serĉvorto Esperanto aŭ Esperantokurso. Certe rakontu al neesperantistoj!

Fonto: *El Popola Ĉinio* http://www.espero.com.cn/2016-05/09/content_38411073.htm



La hungara aktoro Gyula (ekde la esperantistiĝo: Julio) Baghy (1891–1967), siavice filo de aktoro kaj de sufloristino, jam juna verkis poemojn kaj novelojn hungarlingve; sed rekrutite en la hungara armeo por la unua mondmilito li malsaniĝas kaj la hospitalo kie li troviĝas estas konkerita de la rusoj. Komenciĝas

sesjara militkaptiteco, travivita en diversaj kampoj kaj tendaroj, puŝite ĝis Siberio. Dum tiu tempo li komencas poeti en Esperanto (lernita en 1911) kaj instrui la lingvon al siaj diversnaciaj samsortanoj.

Post longa revenvojaĝo tra sudaj maroj fine li atingas Budapeŝton kaj komencas fervore agadi: verviganto de la E-Rondo Amika, gvidanto de kursoj, organizanto de literaturaj vesperoj, tuj en la redakta komitato de Literatura Mondo.

Post premiere manskribita kajereto Bukedo, en 1923 aperas la poemaro *Preter la vivo*, parte verkita ankoraŭ en Siberio kaj dum la reveno hejmen; enestas ankaŭ pecoj muzikitaj, plejparte de lia kunulo en militkaptitejo, Miĥaelo Sárosi. Poezian antaŭulon Baghy rekonas en *Privat*, kies temojn, kiel pri papilio kaj pri tombejo, li sporade tuŝas.

Ĉefaj temoj? Junula amo al knabinoj, tuthomara amo, hororo pri la milita besteco, virinoj solaj kaj malfeliĉaj. Multo biografia enestas: la seniluziigo pri la edzino, kiu ne atendis lin dum tiom da jaroj, la tenera patra amo al la filino. Baghy vidas ĉion tra persona lupeo: pronomo “mi” superabundas, la “ni” rivalas laŭ ofteco.

En tiu volumeto hodiaŭa kritikisto malkovrus pli ol unu mankon: konceptoj tro ripetitaj, iuj versoj preskaŭ nur kejlaj, pluraj rimoj preskaŭ ŝablonaj. Sed la melodio de la versoj, la tute simpla lingvo, la temaro perfekte kongrua kun la “internacia pacifism-esperantisma romantikismo” igos lin amata: Baghy fariĝas la unua poeto legata de sia popolo. Lia melankolia tristo, la tragike finiĝintaj amoj sorĉas la leganton:

*Ne estas por mi ĝojo en la viv',
nek flor' printempa, nek sunbrila flamo...
Ĉe orfa tombo ĉe la montdekliv'
Mi preĝas plore pri l' entomba amo.*

Li ŝatas alpreni la rolon de vagabondo: mizera, senespera, vivanta nur apud kaj per siaj versoj. Apud forno (ripetita temo) li priploras la malfeliĉon de sia dispeliĝinta familio, kaj ankaŭ sopiro al morto estas temo ripetita...

Tamen ne malofte montriĝas majstra traktado de aliteracioj kaj sonalternoj, helpata de la tipografia aranĝo:

*Ond'
post ond'
en danca rond',
zuma kaj brua,
ĉe fulmotondro skua
jen sible susure ĝemas,
jen muĝe murmure blasfemas
kaj jetas sin al rip' de l' baraktanta ŝip'
por peli ĝin per puna fort', pacigi nin kun tera sort'
– en mort'...*

Aperos poste aliaj poemaroj pli rafinitaj teknike, sed vere novajn inspirtemojn li ne trovos plu. Lia famo kreskas ĉefe pro la noveloj kaj la romanoj, kaj lia vivo iĝas malpli premata, sed pli intensa: li aktoras kaj reĝisoras en la UK-oj, iniciatas la tagon de la libro je la naskiĝtago de Zamenhof, gvidas Cseh-metodajn kursojn diverslande. Lia ĉeesto plurloka, lia bonkora vizaĝo de amema instruisto, lia homeco kaŭzas, ke multaj lernantoj aŭ konatoj lin nomas “Paĉjo” (ankaŭ mi, kiu tre agrable restis kun li dum la UK en Bolonjo, 1955).

Lian popularecon nutras la sinsekve aperantaj verkoj: romano *Viktimoj* (1925) kun sia daŭrigo *Sur sanga tero* (1933), poemaro *Pilgrimo* (1926), la satira romano *Hura!* (1930). Baghy poeto osciladas inter espero kaj pesimismo, kvankam la dua forte superas la unuan. Sian trian poemaron *La vagabondo kantas* (1931, 2a eld. kompletigita 1937) li mem nomas “simplaj versoj”; fakte li gurde ripetas siajn rimojn kaj temojn, helpate de lulanta melankolio:

*Ludas la cigano:
violono ploras.
Pri l' pasinta amo
koro rememoras...*

En 1937 aperas romaneto *La verda koro* pri la vivo en Siberio, la Esperanto-kursoj, embria amo inter la

kursestro (identiĝo de Baghy mem) kaj loka junulino. Sukceso vasta, represoj multaj dum duona jarcento: verkon kun Esperanto kiel ĉeftemo la publiko avidas.

La mioldolĉe siropa amovelo Printempo en la aŭtuno (1931) transdonas stafetbastonon al la plej granda produkto de la postmilita Baghy kaj eble de la esperanta poezio entute: la triakta lirika dramo Songe sub pomarbo (1958) kvazaŭ plenumas deziron esprimitan en tiu novelo. Du gejunuloj, Adamo kaj Eva, sonĝas kaj filozofumas sub la Pomarbo, simbolo de la eterna Vivo; ĉirkaŭ ili orbitas mitologiaj kaj modernteknikaj figuroj, la "homunkuloj", la Faŭno, la Nimfo kaj la saĝa Strigo, kiu ilin admonas tiel:

*La Vivo ŝajnas monstra maro;
sur ĝi la Homo – ludoŝip’.
Ne gravas kvanto de la varo
nek la kvalito nek la tip’.
La ŝipo serĉas rodon; fate
ĉe bord’ perdiĝas ĉiam cel’;
do onfrapite sortpelate
ĝi velas plu kun dub’ esper’
kaj ek laŭtajde ondoraĵde
de ondosupro al ondvalo
ŝanĝinte ofte revojn trajte
sed nesciante pri l’ kialo.
Kialon senlimec’ ne havas
(la monstra maro ludas nur)*

*la ŝipon lulo, skuo trafas;
ĉe ĉiu ondo – aventur’.
La Homo, estro de la Ŝajno,
imagas sin ja suveren’,
nur pensas pri la ebla gajno,
disipas forton en la pen’
kaj ek plenvele novacele
nescie pri la ŝiporompo
li drivas fide kaj sinpele
ĝis glutas lin la – ondotombo.*

La grandajn temojn de la vivo Baghy traktas alimaniere ol Auld, sed same intense: la sonĝo permesas al li alveni al pura, eksterfilozofia poezio. Kelkaj aliaj verkoj, poeziaj, novelaj kaj teatraj sekvos en la postaj jaroj, sed tion kion Baghy povis diri, li jam diris sonĝante sub pomarbo.

Carlo Minnaja

*Fonto: Ĉi tiu artikolo aperis en la februara kajero de La Ondo de Esperanto (2012).
Papere: La Ondo de Esperanto, 2012, №2.
Rete: La Balta Ondo
<http://sezonoj.ru/2012/02/trezoro208/>*

Vortareto

		komitato	komite	ondosupro	dalga tepesi
		koncepto	kavram	ondotombo	dalga mezari
admoni	ihtar etmek	kongrua	uygun olan	ondvalo	dalga dibi
aliteracio	deĝiŝikliĝe uĝrama	konkeri	fethetmek	orbiti	yörüngeye girmek
atingi	ulaŝmak	kritikisto	eleŝtirmem	orfo	yetim, öksüz
besteco	hayvanlık	kunulo	birlikte olan kiŝi	osciladi	osile etmek
blasfemi	küfretmek	laŭtajde	gelgite göre	papilio	kelebek
bruo	gürültü	literaturo	edebiyat	peco	parça
disipi	daĝitmak yok etmek	lulo	bebek sallama	pelipuno	bir yerden atılma cezası
dispeliĝi	ayırma, uzaĝa gönderme	lupeo	büyüteç	poemaro	ŝiir kitabı
diversnacia	farklı milliyetler	majstra	ustaca	populareco	popülerlik
drivi	sürüklenme	manskribi	elle yazmak	premi	baskı yapmak
E-Rondo	Esp. ĉevresi	melankolio	melankoli	premiere	başlangıçta gelen
Faŭno	faun, pan tanrısı	mioldolce	bal tatlısı şeklinde	pronomo	şahıs zamiri
fervore	ateşli	miliktaptiteco	savaş esirliĝi	rafinita	rafine edilmiş
fulmotondro	gökgürültüsü şimşek	mizera	sefil	redakti	redakte etmek
gurde	org şeklinde	monstro	canavar	rekoni	tekrar tanımak
gvidanto	rehber	montdeklivo	daĝ yamacı	rekruti	işe alım
hororo	korku	muĝi	"möö"lemek	revenvojaĝo	geri dönüş seyahati
iniciati	başlatmak	murmuri	mırıldanmak	rimo	kafiye
inspiritemo	esinlenme	Nimfo	su perisi	rivali	baş kaldırmak
kajereto	küçük defter	ofteco	sıklık	rodo	liman dışı gemi sığınağı
kampo	tarla	ondoraĵde	dalgaya binmiş şekilde	rondo	daire

samsortano	aynı kaderi paylaşan	sporade	seyrek	tragiko	trajik
senespera	umutsuz	stafetbastono	destek bastonu	trajte	özellik, karakter olarak
seniluziigo	hayal kırıklığı	Strigo	baykuş	traktado	muamele
siavice	sirasında	sufloristo	süflorcu, rolü fısıldayan	travivi	yaşamak, çekmek
sibli	fısıldamak	superabundi	çok fazla olan	tristo	üzüntü
sinsekve	takip eder şekilde	susuri	haşırdamak	tuthomara	tüm insalığa ait
skui	sallamak	suveren	hür	vagabondo	serseri
sonalerno	anagram	tendaro	çadır, kamp	verki	yazmak
sopiro	umut	tenera	sevecen	verso	mısra
sorçi	büyülemek	tipografia	resimsel	verviganto	ilham veren
sortpelate	kaderin götürdüğü şekilde tombejo		mezarlık	zumi	vızıldamak, arı gibi

Opinio

Lingva Egaleco

Ĉu ekzistas lingva egaleco? Onidire jes, sed tamen en la praktiko ni ĉiutage spertas, kelkaj lingvoj ĝuas privilegion.

Antaŭ nelonge mi vizitis apudlandliman aŭstran urbeton proksime al la hungara urbo Kőszeg. Antaŭ la unua mondmilito ĉi teritorio apartenis al Hungario. Ankoraŭ nuntempe tie vivas hungaroj, kiel aŭstraj civitanoj. Vere mi ne scias ilian nombron, sed tio ne gravas.

En tiu aŭstra urbeto mi vane serĉis hungarlingvajn informojn. Ne pro la tieaj hungaraj praloĝantoj. Ĉiutage miloj da hungarlandanoj vizitas, traveturas ĝin.

Sed se ni rigardas, en Hungario kun la angla preskaŭ ĉie estas legeblaj ankaŭ germanlingvaj informoj.

Al multaj homoj ĉi tiu eĉ ne pikas la okulojn. Ili preteriras ĝin. Kial ĉagreni pro tio? - certe ili pensas.

Tamen, laŭ mi tio ne estas bona. Similan situacion mi spertis ankaŭ en aliaj najbaraj landoj kies lingvo, same

kiel la hungara ne apartenas al la familio de la mondlingvoj.

Ekzemple en rumana urbo, kie vivas hungaroj apenaŭ oni renkontas hungaran tekston. En la muzeo estas diverslingvaj ĉiceronoj, eĉ ofte ankaŭ en iu stranga lingvo, sed mankas hungara. Se oni volas ekkoni kaj kompreni la ekspoziciitaĵojn, tiam oni devas ellerni angle, france, aŭ germane.

Ĉu ekzistas justa solvo? Kompreneble, se en tiuj ĉi landoj ankaŭ la hungaran lingvon oni uzas en pli vasta rondo aŭ nur Esperanto estus uzata, kiel dua gepatra lingvo.



Ĉu tio estas sonĝo?

Eble. Sed oni devas esperi, ke iam tiu ĉi fantasta sonĝo realiĝos kaj malaperos la lingva malegaleco.

Fonto : Vesperto Revuo #257 oktobro 2013

Gramatiko



KIO ESTAS LA AKUZATIVO? (parto 3)

En niaj pasintaj numeroj ni parolis pri:

- La akuzativo uzata en la rekta objekto de transitivaj verboj. (parto 1)
- La akuzativo pri mezuroj (tempo, distanco, kaj tempo punkto). (parto 2)

En ĉi tiu numero ni parolos pri la tria formo de la akuzativo : "**La akuzativo de direkto**". Tiu estas la

akuzativo kiu respondas demandojn : "al kie", "al kiu flanko" ktp.

1) Akuzativo pri destinitaj lokoj: Kiam oni iras aŭ veturas al iu loko ni uzas la akuzativon kiu fakte estas tre simpla. Ekzemploj:

- Morgaŭ mi veturos Kinŝaso-n (... al Kinŝaso)
- La vagonaro veturas de Tabrizo Teherano-n (... al Teherano)

Oni uzas tian akuzativon ĉefe por destinitaj lokoj sed

oni normale ne diras "mi iros kuraciston" sed "mi iros al kuracisto". (Bonvolu ne konfuziĝu kun la formo "mi vizitos kuraciston" ĉar tiu estas la akuzativo de la rekta objekto)

2) Akuzativo kun prepozicioj "en", "sur" kaj "sub": Kiam en la frazo estas movo, ekzemple "al en", "al sur", "al sub" tiam ni uzas akuzativon. Ekzemploj:

- La kato kuras sub la tablo. (la kato estas sub la tablo kaj kuras sub ĝi)
- La kato kuras sub la tablo-n. (la kato ne estas sub la tablo sed kuras al sub la tablo)
- La hundo kuras en nia domo. (La hundo estas en la domo kaj kuras tie)
- La hundo kuras en nian domo-n. (La hundo estis ekster la domo sed nun kuras al la interno de la domo)

3) Akuzativo de plua movo : Normale kun aliaj lokaj prepozicioj oni ne uzas akuzativon tamen oni povas uzi ĝin **se estas "plua movo"**. Jen kelkaj malfacilaj ekzemploj:

- La hirundo flugis trans la rivero-n, ĉar trans la rivero sin trovis aliaj hirundoj.
- La sago iris tra lian koron. (La sago plene penetris lian koron kaj iris pluen)
- La vojo kondukis preter preĝejon. (ni preterpasis la preĝejon kaj iris pluen)
- Siajn brakojn ŝi metis ĉirkaŭ mian kolon. (montras moviĝon al loko, kiun oni atingas per ĉirkaŭmovo)
- Li kuris ĉirkaŭ la angulon de la domo. (same)
- Li kuris kontraŭ la muron kaj vundis sin. (por montri, ke la kontraŭmovo atingis sian celon, kaj kuntuŝiĝas kun ĝi)
- Gardu vin, ke vi ne venu plu antaŭ mian vizaĝon. (...al loko antaŭ mia vizaĝo)
- Mi estis en la urbo kaj iris poste ekster ĝin. (...al ekster ĝi)
- Li iris inter la patron kaj la patrino. (al loko inter la patro kaj la patrino)
- Morgaŭ mi venos ĉe vin. (tradicie oni preferas: Morgaŭ mi venos al vi)

Sed jen kelkaj malfacilaj ekzemploj en kiuj ne estas tia akuzativo ĉar la akuzativo fakte estas en ia subkomprenata esprimo:

- Jakob enfosis ilin sub la kverko. (Jakob enfosis ilin "en la grundon" sub la kverko)
- Oni metis antaŭ mi manĝilaron. (Oni metis "sur la

tablon" antaŭ mi manĝilaron)

4) Akuzativo post lokaj adverboj. Ekzemple:

hejme = en la hejmo	→ hejmen = al la hejmo
urbe = en la urbo	→ urben = al la urbo
ekstere = ekster io	→ eksteren = al la ekstero de io
tie = en tiu loko	→ tien = al tiu loko, en tiu direkto
kie = en kiu loko	→ kien = al kiu loko, en kiu direkto
ĉie = en ĉiu loko	→ ĉien = al ĉiu loko, en ĉiu direkto
ie = en iu loko	→ ien = al iu loko, en iu direkto
nenie = en neniu loko	→ nenien = al neniu loko, en neniu direkto

5) Akuzativo por aliaj signifoj

Mi ridas je/pro lia naiveco

→ Mi ridas lian naivecon.

Neniam ŝi miros pri/pro sia propra malaltiĝo

→ Neniam ŝi miros sian propran malaltiĝon.

Fine iomete pri **la uzado de akuzativo kun propraj nomoj**. Por tio oni kelfoje devas aldoni substantivan finaĵojn "o". Jen kelkaj ekzemploj:

Ĉu vi konas Anna-n?

Ĉu vi vizitis Mehmet-on?

(fino)



La ŝuetoj de la reĝidino

Iam estis, iam ne, trans la Fabeloceano estis reĝo, kiu havis belegan filineton. Ŝi estis tiom belega, ke la famo de ŝia beleco estis konata ankaŭ en foraj landoj. Lia patro estis tre fiero pri sia filino.

En iu tago la reĝo decidis, ke edzinigos ŝin. En la tuta lando estis alvokitaj princoj, grafoj, baronoj kaj grandsinoroj, ke ili aliĝu fariĝi kandidatoj, kiel la estonta edzo de la reĝidino. Estis unusola kondiĉo: tiu povos fariĝi ŝia edzo, kiu donacos tiajn ŝuojn al ŝi, kiuj instruos danci la filinon de la reĝo, ĉar ŝi ne scipovis danci. Kvankam la profesoroj de la dancoj multfoje deziris instrui tion al ŝi, vane ili klopodis, la reĝidino ne povis ellerni, eĉ la plej facilajn paŝojn. Pro tio ĉiu hontis en la fortikaĵo.

Venis kandidatoj portante ŝuojn orajn, arĝentajn, ornamitajn per diamantoj. Bedaŭrinde neniu ŝuoj povis instrui la reĝidino danci. Ili ĉiuj asertis, ke la portitaj ŝuoj faros miraklon.

Post kelkaj movoj la reĝo kun la korteganoj, la reĝidino ne povas danci.

Tio ege malgajigis ĉiun. Intertempe elĉerpiĝis la kandidatoj kaj ili restis solaj. La reĝo sidis sur la trono melankolie kaj li ĉagrenis pro la fiasko. Kiel akiri tian junulon, kiu povos porti miraklajn ŝuojn por la reĝidino? Nepre li devos eltrovi ion. Reĝidino ĉiu priridos, se baldaŭ ŝi ne ellernos danci. Kia estos la geedza ceremonio, se ŝi nur sidos ĉe la tablo kaj la aliaj gastoj amuzigos sin dancante. Fine la nobbakita edzo forlasos ŝin kaj li serĉos por si knabinon, kiu scipovas danci.

Kiel li malgajis en la tronejo, neatendite envenis junulo, kiu estis servisto en la fortikaĵo. La reĝo kolereme alkriis lin:

-Kion vi volas? Diru rapide, ĉar mi ne havas bonhumoron.

La servisto venis pro tio, ĉar la ĉefkuiristo demandis, kiam deziras tagmanĝi la reĝo.

-Hodiaŭ mi ne deziras tagmanĝi. For de mi! Mi senkapigos vin, se vi ne foriros tuj.

La junulo ne ektimis, eĉ plu li demandis la reĝon.



-Mia reĝa Mosto, pardonu min pro mia kuraĝo, bonvolu diri al mi, kial vi havas malbonhumoron! Eble mi povos helpi al vi.

-Kiel vi povus helpi? Ja vi estas nur simpla servisto ĉe mi, sed se vi deziras, malkaŝas al vi la sekreton. Mia belega filineto ne povas danci, kaj ne ekzistas tiaj ŝuoj, kiuj povus instrui al ŝi tiun ĉi sciencon.

-Ĉu nur tio estas la problemo? – ekridis la junulo. – Ĝis la sunsubiro mi instruos tion al ŝi.

-Ja, vi ne havas dancoŝuojn, kiel vi povus instrui tion al mia kara filineto?

-Mia reĝa Mosto pro tio ne ĉagrenu! Voku ĉi tien vian filinon, por ke ni povu komenci la dancolecionon.

La reĝo amare obeis al la servisto kaj vokis la reĝidino.

La junulo diris al ŝi:

-Senŝuiĝu, kaj estu kiel mi, nudpiede.

Ŝi vole nevole liberiĝis de siaj oraj ŝuetoj kaj en la tronejo komenciĝis la leciono. La reĝo ordonis al la muzikistoj muziki por la dancantoj.

Komence la reĝidino iom mallerte sekvis la junulon, sed subite la belega melodio sorĉis ŝin. Nudpiede ŝi sentis sin libera, kaj ili flugis sur la planko, kiel la birdo.

Kiam la Suno ĝuste volis malaperi malantaŭ la montoj, la reĝidino ellernis la dancadon. Ŝia patro tre miris kaj dankegis al sia servisto, kiu instruis danci la reĝidino.

-Filo mia, petu ion ajn! Mi plenumos vian deziron.

Dum la dancado la gejunuloj enamiĝis unu al la alia kaj li diris al la reĝo:

-Mia reĝa Moŝto, mi ne diras oron, arĝenton, donu al mi la manon de via filino, ĉar mi tre amas ŝin.

La reĝo ne kontraŭis la peton. Li feliĉe konsentis, ke post tri tagoj okazu geedza ceremonio.

Opinio

Kial Esperanto ne povis disvastiĝi tra la tuta mondo?

Ĉiu konsentas, la zamenhofa lingvo estas grandioza, kaj dum ĝia pli ol centjara ekzisto estas pruvita ĝia vivkapablo. Tamen ankoraŭ ĝi ne povis disvastiĝi, fariĝi la dua gepatra lingvo de la homaro.

Se ĝi okazus, solviĝus multaj lingvaj malfacilaĵoj kaj miskomprenoj, kiuj malgajigas la ĉiutagan homan kontakton.

La respondo estas malfacila, kaj efektive neniu povas klarigi ĝin akcepteble.

Oni diras, kial krei artefaritan lingvon por helpi la internacian komunikadon, kiam ĉi tiun rolon jam plenumas la angla lingvo? Ĝi estas vaste uzata sur ĉiu tereno.

Ĉu efektive la angla lingvo solvis ĉi tiun gravan problemon de la homaro?

Estus bone kredi, ke jes. Sed la fakto tio, ke en la mondo plu daŭras la lingvaj miskomprenoj kaj centmiloj eĉ milionoj parolas fremdajn lingvojn. Malgraŭ la intensa propagando, ankaŭ la angla lingvo estas nur eblo, kiel la aliaj plifaciligi la komunikadon inter diverslingvaj homoj.

Kompreneble tiu ĉi ne trankviligas esperantistojn De tago al tago ni spertas, la disvastiĝo de Esperanto stagnas, en multaj landoj ĝin parolas nur maljunuloj. La junan generacion apenaŭ interesas la Internacia Lingvo.

Mi tre ŝatus, se oni rekonus la grandegan eblon en Esperanto kaj oni amase eklernus ĝin.

Fakte en Hungario multaj homoj lernas ĝin ĉiujare pro premdevigo. Nur tiu studento de altlernejo aŭ

Eble tiel okazis, eble ne. Kiu ne kredas, tiu iru tien kaj konvinkiĝu propraokule.

-Onklo Adalberto-

Fonto : Vesperto Revuo #257 oktobro 2013

universitato ricevas diplomon, kiu havas atestilon pri ŝtata lingvoekzameno el iu lingvo. Tial oni prefere elektas Esperanton, ĉar ĝi estas ellernebla pli facile kaj rapide ol aliaj naciaj lingvoj.

Kie estas tie ĉi homamaso? En 2010 Esperanto estis la tria plej ofte elektita lingvo post la angla kaj germana. Ĉu la akirita lingvoscio forvaperiĝis? Kial ni ne revidas tiujn ĉi personojn en Esperanto Movado.

Nur kelkaj el ili restos por la zamenhofa lingvo, la aliaj ripozas sur sia sidvango.

Ilia dormo estas granda perdo por Esperanto. Tiuj ĉi homoj forĵetas sian atestilon pri sukcesa lingvoekzameno. Ili neniam provis la ellernitan lingvon en la ĉiutaga vivo.

Eble, se ili havus pozitivajn spertojn, tiam ŝanĝiĝus ilia opinio kaj en la estonto ili uzus Esperanton dum siaj eksterlandaj vojaĝoj, laboroj kaj sur alia tereno de la vivo.

-Ŝaŝa-

Fonto : Vesperto Revuo #257 oktobro 2013





Tekrar merhaba,

Bu ay da olağan kursumuza devam ediyoruz. Kursumuz çok basit bir kitap olan Avustralyalı G.Gladstone

Solomon'un "Esperanto por infanoj" adlı 1934 basımı çok eski bir kitaptan. Her ay bu kitaptan bir ders çalışıyoruz. Bu derslerin sonuna ekler, sözlük ve dilbilgisi ile ilgili kısa tanımları veriyoruz. Eski dergilerinizi atmayın çünkü bu dilbilgisi tanımlarını ya

da açıklamalarını bir kere veriyoruz, sonraki derslerde bunları bildiğinizi varsayıyoruz. Aklınıza takılan bir şey olduğunda önceki sayılara dönüp yaptığımız açıklamaları hatırlamaya çalışın.

Hatırlıyorsanız metin içindeki tirelerin ("-") kelime ön ve arka ekleri ile birleşik kelimelerin ana kelimelerini gözle ayırtılabilmek için kullanıldığını söylemiştik. Bu dersten itibaren basit ekleri (fiil, isim, sıfat vs eklerini) artık ayırmıyoruz, sadece gerçek ön ve arka ekleri ile bileşik kelimeleri ayırıyoruz.

LA ĜARDENO

Sinjoro Muso havas ĝardenon. Ĝi estas bela ĝardeno!

En la ĝardeno estas du grandaj arboj, kaj ses belaj floroj.

La tri infanoj ludas en la ĝardeno.

Kiam la suno brilas, kaj estas varme, tiam ili ludas sub la grandaj arboj.

Kiam la suno ne brilas, kaj estas mal-varme ili ne ludas sub la arboj.

Kiam pluvas, tiam ili ludas en la domo, en la ludo-ĉambro.

Kiam la suno brilas, kaj sam-tempe pluvas, tiam estas ĉiel-arko.

La ĉiel-arko estas en la ĉielo. Ĝi estas tre bela !

En la ĉiel-arko estas sep koloroj: ruĝo, oranĝo, flavo, verdo, bluo, indigo, kaj violo.

Ĉu vi havas skatolon da kolor-il-oj? Ĉu vi havas penikon?

Bone! Pentru la bildon de la ĝardeno kaj domo de Sinjoro Muso.

La muroj de la domo estas ruĝaj, kaj la tegmento flava.

La kamen-tubo estas ruĝa, kaj la fumo griza.

La pordo estas verda. La ronda tablo ankaŭ estas verda.


La suno estas flava; la ses floroj ankaŭ estas flavaj.

La ĉielo estas blua.

Se vi ne havas skatolon da kolor-il-oj, aŭ se vi ne havas penikon, uzu paŝtelojn.

Kelime Aĉıklama




arko	yay	ĉielo	gökyüzü
bildo	resim , fotograf	duono	yarım
bluo	mavi renk	flavo	sarı renk
brilas	parlıyor (brili : fiilin mastar formu)	fumo	duman
ĉiel-arko	gök kuşağı	griza	gri
		herbo	ot
		indigo	lacivert renk



domo kaj ĝardeno de Sinjoro Muso

herbo

la vosto de muso



kamen-tubo	baca	ruĝo	kirmiti renk
kiam	ne zaman	sama	ayni
kolor-ilo	renk aleti, boya kalemi	sam-tempe	ayni-zamanda
koloro	renk	sub	alt
mal-varme	soĝuk (sıcak olmayan)	suno	güneş
muro	duvar	tegmento	dam
oranĝo	portakal renk	tempo	zaman
paŝtelo	pastel boya	tiam	O zaman
peniko	firça	varma	sıcak (sifat)
pentru	resim yap (pentri : fiilin mastar formu)	varme	sıcak (zarf)
piro	armut	verdo	yeşil renk
pluvas	yaĝıyor (pluvi : : fiilin mastar formu)	violo	eflatun (menekşe) renk
pomo	elma	vosto	kuyruk

Kapanış



Bir dergimizin daha sonuna geldik.

Bu dergimizdeki "Majo" yani "Mayıs" adlı yazıyı okudunuz mu? Kişi hikayenin ortasına gelene kadar konu hakkında bir fikir edinemiyor değil mi? Oldukça komik bir hikaye idi.

Sizlere "La Eta Princo" yani aslında bana göre büyükler için bir çocuk romanı olan ünlü "Küçük Prens" kitabı ile ilgili bir bağlantı verdik. Kitap çok uzun değil ve gelişme seviyesinde olanlar için oldukça uygun bir kitap. Verdiğimiz bağlantıda kitabı sayfa sayfa okuyabiliyorsunuz, ve her bir kelime üzerine tıkladığınızda karşınıza o kelimenin anlamı, ne yazık ki İngilizce olarak, geliyor. İngilizce bilenler için çok önemli bir kaynak.

Vesperto dergisinden iki kısa yazı yayınladık, birisi "Dil Eşitliği" diğeri de "Neden Esperanto Dünyada Yeterince Yayılmadı" konusunda kişisel düşünceler.

Gene, kitap eleştirisi kısmında Gürcülerin efsanevi yazarı Şota Rustaveli'nin 1200 yılı civarında kaleme aldığı epik şiiri "Kaplan Postlu Şövalye" kitabı hakkında bilgi verdik. Şiir diyoruz ancak okurken hiç de bu kanıda olmuyor insan. Düz yazı bir roman okur gibi rahat okunabiliyor eser, dolayısı ile şiir sevmeyenleri korkutmasın. Efsane, Arabistan'dan Afrika'ya ve oradan Hindistan'a hatta Çin'e kadar uzanan geniş bir coğrafyada geçen bir aşk ve macera hikayesi. Kitabı 1980'lerde Gürcü Esperantist Zurab Makaşvili Esperanto diline çevirmiş, Gürcü arkadaşımız Nana Khizambareli de öğrencilik sırasında bu çalışmaya katılmış ve kitap 1989'da Esperanto dilinde ilk baskısını yapmış. Şimdilerde

kitap tükenmiş durumda. 2014'te Gürcistan'ın başkenti Tiflis'te yapılan 7. Ortadoğu toplantısının teması olarak kitap UEA'nın sayfasına girilmiş ve baştan redakte edilmişti. Benim de o zamanlar kitap şeklinde yazdırılabilmesi için kitabı düzgün pdf formatına sokmak gibi basit bir yardımım olmuştu. İsteyenler kitabı web'den UEA'nın sayfasından okuyabilir, isteyen de bana yazarsa kitabı pdf olarak e-posta ile gönderebilirim.

Konural Sunal arkadaşımızın fantasti dünyasında kaleme aldığı iki hikayeden birer küçük parçayı tercüme edip yayınladık. Felsefe tarihine Epikuros'un öğretisi ile devam ettik. İlginç ve okumanızı öneririz. Bunun dışında başlangıç seviyesindekiler için daha başka küçük hikayeler, yemek tarifleri, dilbilgisi, ve Esperanto kursumuzun 6. kısmı ile zenginleştirdik dergimizi.

Fıkralarımızı okuyor musunuz? Esperanto öğrenirken en iyi çalışmalardan birisi fıkra ve karikatür tercüme etmektir. Kısa bir çalışma olduğundan kişinin sıkılmadan, yorulmadan yapabileceği bir şeydir. Ayrıca Esperanto "Ŝerc" grubuna post edildiklerinde bir çok kişi okuyup düzeltmeler de önerebiliyor. Bulmacalarımızı çözüyor musunuz? Profesyonel değiller belki ama PIV sözlüğünden aldığımız anlamları ile hazırlıyoruz. Dili öğrenmekte çok yararları olacaktır. Bu sayının çözümü aşağıda.

Hepinizden yazı göndermenizi bekliyoruz, Türkçe de olabilir. Ayrıca Esperanto ve dergi hakkındaki fikirlerinizi de paylaşın lütfen.

Sonraki sayımızda buluşmak üzere simdilik **Hoşçakalın.**

DONACO POR VI !

Kune kun la junia numero ni donacas al vi la libreton ni disdonis en la 9-a Mezorianta Kunveno al la partoprenantoj:

Nazim Hikmet Ran kaj Liaj Poemoj



Solvo de la krucvort-enigmo de la paĝo 9

	I		O			O	T	N	O	P		12
O	N	O	R	K		N			N		O	11
	O	K	O		J	O	E	N	R	E	L	10
O		R				A			E		I	9
L		O	I	B	O	G		V	A	O	N	8
I	R	P			V		O		A	F		7
D			O		O	N	R	U	K	U	K	6
O	N	A	L		K		U			G		5
K			J	O	L	U	K	O			O	4
O	M	R	A	L	A		V	I	O	R	T	3
R				A		O	P	A			O	2
K		E	L	B	E	N	P	E	M	O	K	1
												12
												11
												10
												9
												8
												7
												6
												5
												4
												3
												2
												1